## Akompanaj eventoj

*Bildo kaj vorto / Inter la mondoj*. Ekspozicio de judaj papertranĉaĵoj de Monika Krajewska

En la tagoj **10–16 de decembro** okazos trejnado pri interkulturaj kompetentecoj kaj laboro kun rifuĝintoj kadre de la programo Erasmus+

La **16-an de decembro** en la kafejo Fama (str. Legionowa 5) okazos renkontiĝo de Bjalistoka Lingvokafejo, interalie kun Esperanto-tablo

## Aktuala programo

espero.bialystok.pl/eo/bzt-2024

Bjalistoka Esperanto-Societo organizas la renkontiĝon kun subteno kaj kunlaboro de Bjalistoka Kulturcentro / Centro Ludoviko Zamenhof, Podlaĥia Libraro Łukasz Górnicki en Bjalistoko, Junulara Kulturdomo kaj la 7-a liceo en Bjalistoko. Partnero de la evento estas la urbo Bjalistoko. La organizantoj havas la rajton ŝanĝi la programon.

La 25-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj kaj la 14-a Literatura Konkurso okazas sub alta protektado de la urbestro de Bjalistoko.

# 25-aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj

13–15 de decembro 2024

**Akceptejo kaj libroservo**

programoj, mendoj, pagoj; koridoro ĉe la 2-a etaĝo

vendredon 13.12 ekde 17:00
sabaton 14.12 ekde 11:00

## Vendredo, 13 de decembro

**17:00** CLZ, supra salono
Malfermo de Zamenhof-Tagoj. Resumo de la literatura konkurso *Esperanto ligas homojn. Mia viv-aventuro*, enmanigo de premioj. Prezento de Bjalistokaj Kajeroj n-ro 14 kun konkursaj verkoj. Anonco de la temo de la venontjara konkurso

**17:15** CLZ, supra salono
Mallonga animacia filmo *Eta Zamenhof iras en la urbon*, reĝ. de Antonina Brühl, kun subteksto en Esperanto

**17:30** CLZ, supra salono
Prezento de la noveldonita membiografio *Romano pri Romano* de Roman Dobrzyński kaj renkontiĝo kun la aŭtoro

**18:00** CLZ, supra salono
Filmo de Roman Dobrzyński pri la ĉi-jara Universala Kongreso en Tanzanio

**18:30** CLZ, supra salono
Koncerto de Zuzanna Kornicka kaj Mirek Bartkowiak

**19:30** Esperanto-klubejo, str. Piękna 3
Amika rondo kun vespermanĝeto

## Sabato, 14 de decembro

**9:00** Junulara Kulturdomo, str. Żabia 5
*Donaco al Ludoviko. Anĝelo kudrita laŭmezure...* – metiejo pri kudrado, brodado, feltado, teksa dekorado de anĝelo (la nombro de partoprenantoj estas limigita ĝis 20 personoj, demandu pri liberaj lokoj)

**11:00** CLZ, supra salono, serio de prelegoj
- Walter Żelazny: *Esperanto kaj antisemitismo* (pole)
- Nina Pietuchowska: *Homoj skribas kartetojn, poŝtkartojn, bildkartojn*
- Viviana Isernia: *Miaj lingvoj kaj Esperanto*

**13:00** CLZ, malsupra salono 105
Komuna manĝo (mendu/pagu en la akceptejo)

**14:00** malnova paroĥa preĝejo, str. Kościelna 2
Katolika meso en Esperanto

**15:00** placo Paweł Adamowicz
Solena flormetado al la monumento de L.L. Zamenhof okaze de lia 165-a naskiĝdatreveno

**15:30** CLZ, supra salono, serio de prelegoj
- Iza Walentynowicz: *M+B Robineau, ok jaroj ĉirkaŭ la mondo*
- Jolanta Chrustowicz: *Kiel Bjalistoko eksentis blusan muzikon. Ryszard „Skiba” Skibiński kaj Kasa Chorych*

**16:30** CLZ, supra salono
Koncerto de Ukulele Senior Group kaj Orkestro de Diversaj Formoj el Municipa Kulturcentro en Michałowo, sub gvidado de Lech Mazurek

**17:00** CLZ, supra salono
Arta programo de junularo el la 7-a liceo en Bjalistoko: multlingva koncerto, ilustritaj rakontoj en la formo de la teatro kamiŝibajo en Esperanto, poezio de Kajetan Rudawski kun fona prezento de fotoj kaj grafikaĵoj

**18:00** CLZ, supra salono
Koncerto de Inicialoj D.C.
*i.d.c. estas muzikprojekto fondita de Éric Languillat bazita en Offenbach-ĉe-Majno (Germanio). La artisto miksas influojn de alternativa popo kaj elektronika muziko por krei buntan melankolian popmuzikon, en kiu akustikaj gitaroj dancas kun spicaj drummaŝinoj kaj prasinteziloj el alia jarcento. La koncertoj kutime enhavas sinkronizitajn videofilmojn, kaj estas ankaŭ okazoj prezenti akustikajn versiojn de la kantoj.*

**19:00** CLZ, malsupra salono 105
Naskiĝtaga kuko de Ludoviko

**20:00** Esperanto-klubejo, str. Piękna 3
Amika rondo kun vespermanĝeto

## Dimanĉo, 15 de decembro

**7:30** Esperanto-klubejo, str. Piękna 3
Tuttaga ekskurso *En la orienta ĉelimejo*; reveno je 19:00 (ne plu mendebla; pagu en la akceptejo)